UEA: Malferma Tago omaĝis Erasmon kaj Morariu

La 34-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, kiu okazis la 14-an de majo, allogis 70 vizitantojn el 14 landoj. Ĝia programo estis grandparte dediĉita al la 500-a datreveno de la apero de Laŭdo de l'stulteco, la plej fama verko de Erasmo. Ĝeneralan enkondukon al la vivo, verkaro kaj signifo de la granda humanisto faris per sia prelego d-rino V. Barandovská-Frank. La tradukinto de Laŭdo de l'stulteco, akademiano G. Berveling faris du prelegojn; li ankaŭ surprizis la publikon per lanĉo de sia nova esperantigo el Erasmo, Antaŭparoloj al la Nova Testamento. En la Malferma Tago estis publikigita ankaŭ alia nova libro, Stelsemantoj en la ora nordo de Katalin Kováts. I. Oneţ prelegis pri la protagonisto, la fama rumana Csehmetoda instruisto T. Morariu. Kiel kutime, en la programo estis ankaŭ multaj filmprezentoj.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Estrarano Florian Mayer de Stiria Esperanto-asocio ricevis ordinon

Junie d-ro F. Mayer, estrarano de Graza Esperanto-societo „Unueco“, ricevis katolikan ordinon. D-ro Mayer naskiĝis 1982 en Graz kaj studis teologion kaj historion. Sian unuan subpastran oficon li plenumos en Köflach. Okaze de sia unua meso li ricevis de la societo meslibron en E-o, kiun li uzas ĉe sia unua meso en la Internacia Lingvo, sabaton, la 6-an de aŭgusto 2011 en la preĝejo de l' Sankta Spirito en Graz.

(Heinz-Paul Kovacic, retgrupo „aŭstraj esperantistoj“)

60-a datreveno de Ĉina Esperanto-Ligo

La 20-an de majo en Pekino okazis celebrado de la 60-a datreveno de Ĉina E-Ligo, kun la ĉeftemo Marŝi kun Espero. Pli ol 260 esperantistoj el Aŭstrio, Brazilo, Hungario, Italio, Islando, Japanio, Korea Respubliko, Pollando, Mongolio kaj el pli ol 20 urboj aŭ regionoj de Ĉinio partoprenis en la celebrado. Chen Haosu, prezidanto de Ĉina Popola Asocio de Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj prezidanto de Ĉina E-Ligo, Guo Xiaoyong, konstanta vicprezidanto de Ĉina Fremdlingva Eldona kaj Distribua Administracio, la unua vicprezidanto de Ĉina E-Ligo, R. Corsetti, eksa prezidanto de UEA, kaj aliaj faris parolon en la celebrado.

(http://esperanto.cri.cn/)

Nova kontribuo al PVZ

Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof, konata kiel PVZ, estas projekto de la japana zamenhofologo Ludovikito (Itô Kanzi). Eldoninte kadre de PVZ entute 58 volumojn en kelkaj serioj, Ludovikito forpasis en 2005, ne sukcesinte presigi ĉion kolektitan. Ĉi-printempe en Japanio aperis KD (lumdisko) kun “nove elfositaj 4 dokumentoj, kompilitaj de ludovikito por pliampleksigi PVZ”

(“La Balta Ondo”, *http://sezonoj.ru/)*

Reta Instruista Trejnado ĉe edukado.net

En la porinstruista paĝaro *www.edukado.net* komence de aprilo estis lanĉita „Reta Instruista Trejnado (RITE)“. En la projekto kunlaboras inter aliaj la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Akademio Literatura de Esperanto (ALE) kaj instruistoj de la esperantologia fako de Universitato Adam Miczkiewicz en Poznan-Pollando. La kursaro celas ebligi akiron de fakaj konoj kaj praktiko pri instruado de E-o, kompletigataj de kulturaj kaj gramatikaj konoj. La ĉefa celgrupo estas klubgvidantoj, instruantoj aŭ instruemuloj, kiuj ne havas eblon partopreni ĉeestan trejnadon aŭ volas profundigi siajn sciojn kaj akiri novajn spertojn. Studi en RITE ĉiu povas laŭ siaj ritmo kaj ebloj, en ajna periodo de la jaro.

(K. Kováts, *www.edukado.net/rite*)

Katolika Sento en Ipernity

Ekde kelkaj monatoj la revuo de la itala sekcio de IKUE estas publikigita en Ipernity je tiu adreso: *www.ipernity.com/home/177224*. Ipernity estas servo kiu ebligas kundividi ĉiuspecajn plurmediajn dokumentojn. 40 tagojn post la unua publikigo oni atingis la nombron de 700 kontaktoj.

(Espero Katolika)

Lernu.net: 100 000 registritaj uzantoj

La retejo Lernu.net, kiu instruas E-on en dekoj da lingvoj, ricevis sian 100-milan registritan uzanton. Laŭ la aktivulo J. Gaus la efektiva kvanto de vizitantoj estas eĉ pli alta, sed granda parto el tiuj, kiuj uzas la retejon, neniam registriĝas. Okaze de tio Esperantic Studies Foundation (ESF) dankis ĉiujn kunlaborantojn de lernu!, kaj ankaŭ ĉiujn esperantistojn, kies malavaraj donacoj kontribuis al tiu ĉi sukceso kaj petas plian financan subtenon, ĉar la fondaĵo ne ricevas monon de ajna registaro, kaj dependas de la donacoj de homoj, kiuj strebas al egaleco kaj plibonigo de komunikado inter la popoloj. Okaze de junia estrara kunsido de ESF en Kalifornio laborgrupo proponis renovigon de lernu!: ĝian kunligon kun la informpaĝaro aktuale.info, kaj la kreon de diversaj novaj eblecoj.

(*www.esperantic.org*)

Herzberg: Inaŭguro de la Arbo-Esplora Pado

La Arbo-Esplora Pado estas komuna projekto kune kun la asocio Futurateliero Herzberg kaj NABU Germanio. Ĉirkau la proksima Jueslago meze en la urbo Herzberg nun ekzistas unika promenvojo kun arbonomoŝildoj en 3 lingvoj (germana, Esperanto kaj latina), jam 53 belaj (ofte raraj) arboj estas parto de tiu esplora pado. *(http://esperanto-urbo.de)*

Nova retejo en facila Esperanto de Emilio Cid

Naŭ el dek homoj, kiuj iom lernis E-on, poste forlasas la lingvon, asertas la iniciatintoj de facila.org, nova retejo kun mallongaj, facile legeblaj tekstoj. Laŭ la iniciatintoj de tiu projekto, tre ofte lernintoj seniluziiĝas, ĉar ili rimarkas, ke E-o ne estas tiel facila, kiel oni asertis al ili, kaj ke ordinaraj tekstoj ne ĉiam estas kompreneblaj sen peno kaj vortaro. Por malaltigi la sojlon, ili kreis retejon kun vere facilaj tekstoj. Komencantoj povas aboni la tekstojn retpoŝte, kaj tiel regule ricevos memorigon plu lerni E-on. Pliajn motivojn klarigas Emilio Cid, Brazila lingvoinstruisto, en intervjuo kun Libera Folio.

(www.liberafolio.org, , http://facila.org/)

Mil arkivitaj elsendoj en arkivo de Radio Vatikana

Danke al la kunlaborantaro M. Leon, kiu prizorgas la arkivon, kaj C. Sarandrea, kiu produktas kun helpo de Hawkes-Teeples, Scotti kaj Corsetti la programojn, komence de junio la nombro da arkivitaj elsendoj de Radio Vatikana en E-o atingis 1000.

(http://radio-vatikana-esperanto.org/)

UEA-Jarlibro 2011 aperis

Komence de junio aperis la nova Jarlibro. Du trionoj de la 288-paĝa libro konsistas el la Delegita Reto kun la adresoj de 1673 delegitoj en 103 landoj (4 el 5 delegitoj estas atingeblaj retpoŝte). Kvankam la nombro de individuaj membroj de UEA malkreskis pasintjare, la nova Jarlibro havas nur 6 delegitojn malpli ol la pasintjara. La fakdelegitoj reprezentas preskaŭ 800 fakojn. En la 1-a parto, eldonita ankaŭ aparte kiel Gvidlibro 2011, aperas adresoj k.a. informoj pri la organoj, instancoj kaj servoj de UEA kaj TEJO, pri landaj kaj fakaj asocioj, akademioj, edukaj kaj kulturaj instancoj, bibliotekoj, radioelsendoj kaj pri E-o en interreto. Individuaj membroj povas uzi la Jarlibran enhavon daŭre ĝisdatigatan ankaŭ rete. (Gaz. Komunikoj de UEA)

Labora rilato de UEA kun ISO disvolviĝas

La partopreno de UEA en la aktivaĵoj de la Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO) komencis plivigliĝi dank' al la nova komisiito M. Maradan. Nun UEA membriĝas en la Teknika Komitato pri terminologio k.a. lingvaj kaj enhavaj datumoj de ISO kaj en la 2-a subkomitato pri terminografiaj kaj leksikografiaj labormetodoj. La subkomitato okupiĝas pri la praktikaj aplikoj de teorioj, principoj kaj metodoj, precipe, kvankam ne nur, por terminologia laboro. Neniu nacia normiga instituto voĉdonis kontraŭ la membriĝo de UEA. La strukturo de la Teknika Komitato kaj de ĝiaj subkomitatoj povas esti malfacile travidebla al neinformitoj, sed en la 96-a UK (Kopenhago) interesitaj kongresanoj havas okazon ekkoni ĝin per prelego en la Terminologia Forumo (Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Germanio: Jubilea moto por 2012

En 1887 aperis la Internacia Lingvo. GEA lanĉas diskuton pri taŭga moto/slogano por la jubilea jaro 2012 por intensigi la publikan agadon. Por kolekti proponojn kaj ebligi diskutadon disponeblas la retpaĝo *http://tricider.com/t/decide/?show=1xdV*

(retgrupo „esper-german")

Pollando: Studenta Parlamento pri la KER-diplomoj

La Studenta Parlamento de la universitato de Varsovio decidis subteni proponon de Pola Esperanto-Asocio al Rektorino de la universitato pri enskribo de Esperanto al la listo de la lingvoatestiloj aprobataj de la universitato. Ĉiu studento antaŭ bakalaŭriĝo devas pruvi sian konon de iu fremda lingvo minimume je la nivelo B2. Kelkaj fakoj – kiel fizika fako – limigis, ke oni devas pruvi lingvokonon de la angla lingvo, sed ĝenerale studento povas ekzameniĝi en la universitato pri libere elektita lingvo instruata en la universitato aŭ doni lingvoatestilon de alia instanco, sed nur de la listo de instancoj, lingvoj kaj lingvoatestiloj difinitaj de la Rektorino.

(P. Fischer-Kotowski, *http://edukado.net/)*

Nova retejo por verki kaj korekti

http://lang-8.com/ estas nova retejo por verki kaj korekti tekstojn en fremdaj lingvoj. Verkantoj povas ricevi korektproponojn kaj spertuloj povas helpi. Esperanto troviĝas inter la lingvoj elekteblaj kiel persona gepatra lingvo aŭ kiel unua kaj dua lernata lingvo.

(retgrupo "esper-inform")

Kolektis kaj prilaboris Uwe Stecher